# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

vendredon, la 1-an de Julio, 2016 • numero kvar

## Salutmesaĝoj el aliaj landoj

*[En la lastaj tagoj ni ricevis plurajn salutojn de lernantoj kaj instruistoj kiuj partoprenis NASK-on en pasintaj jaroj. Jen kelkaj. —Red.]*

***El Kubo:***

Karaj samideanoj kiuj hodiaŭ havas la belan privilegion esti NASKanoj: El tiu ĉi malgranda sed tre legenda kaj historia urbeto Cascorro en Kubo, mi salutas vin varme, elkore kaj frate. Mi memoras ke rezulte de samideana helpemo kaj solidareco mi sukcesis esti ankaŭ NASKano en 2013. Mi estis la sola kubano kiu atingis tian eblon. Tial la lastan tagon, dum salutoj de landaj Esperantaj asocioj, mi esprimis la jenon: "Mi salutas vin nome de KEA (Kuba Esperanto-Asocio) kaj samtempe vokas ĉiujn faligi, tute dispecigitaj, barilojn kiuj bremsas kunfratiĝon inter usonanoj kaj kubanoj". Kaj ŝajnas ke tio haste realiĝos.

Danke al helpemo de samideanoj, mi, malriĉa profesoro monrilate, sukcesis viziti kelkajn landojn kaj kontaktiĝi kun aliaj kulturoj. Tio tre signife ampleksigis mian scion, kaj plenkonsciigis min pri neceso de alproksimiĝo inter la homoj sur nia terglobo. Sed nenia organizaĵo – landa, regiona aŭ monda – kaj malpli solaj individuoj, povas atingi kion UEA, dum pli ol jarcento faris cele al uniĝo de la homoj. Mi ne mencios laboron kaj spurojn de elstaraj samideanoj disvastigantaj amon kaj solidarecon tra la mondo, nek grandiozan kulturagon de UEA, nek veran, efikan kaj praktikan forton kaj valoron de Esperanto por atingi pacon kaj fratecon… mi nur petas al vi cerbumi, pripensi kaj esprimi pere de la NASKa Fasko viajn konsiderojn al la jena demando: "Kial UEA ankoraŭ ne estas ricevinta nobelpremion?"

*— Prof. Ricardo Salazar Crespo, Honora Membro de KEA, kaj UEA Delegito*

***El Britujo:***

Miaj pensoj kuŝas ĉe NASK kaj mi volas deziri al vi ĉiuj agrablan kaj sukcesan sesiaron ĉe William Peace.

De difinita vidpunkto mi ĝojas, ke ĉi-jaron mi ne ĉeestas, ĉar mi dubas, pro la katastrofa brita decido eliri el Eŭropa Unio, ĉu mi povus koncentriĝi pri instruado… eĉ legi la kursmaterialon pro la larmoj en la okuloj, pro la pezo en la koro.

Aliflanke, okupiĝo pri NASK eble helpus forgesi, kaj memorigi, ke ekzistas en la mondo aferoj pli gravaj ol nuraj politikaj: translima amikeco, interkompreniĝo, amo, humanismo kaj Esperanto.

Kaj ankaŭ la bieroj ĉe la apuduniversitata paradizo, pardonu, trinkejo. *[Bedaŭrinde…*

---

La *NASKa Fasko* estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Sendu poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn (aŭ eĉ amleterojn), artikolojn pri viaj ŝatokupoj, ks.


Portu kontribuaĵojn al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ eĉ pli bone, sendu ilin retpoŝte al:

<nask.esperanto@gmail.com>

**Kaj… se vi estas en la supera kurso**, bonvolu volontuli por helpi lernantojn en aliaj niveloj verki aŭ poluri siajn verkojn.

---

## Kio okazos hodiaŭ?



★ **7:30 – 8:15 atm**
Matenmanĝo
*Belk Dining Hall*

★ **8:30 – 12:15 ptm**
Lecionoj
*Flowe, unua etaĝo*

★ **12:30 – 1:15 ptm**
Tagmanĝo
*Belk Dining Hall*

★ **2:00 — 3:15 ptm**
Filipo kaj Elizabeto Dorcas: Misia helpo en Panamo
*Flowe*

★ **5:45 — 6:30 ptm**
Vespermanĝo
*Belk Dining Hall*

★ **7:00 — 8:00 ptm**
KTF: Film-vespero
*Flowe*

★ **8:00 — 9:00 ptm**
juda diservo kun Jarlo Bills
*Flowe*

☞ *La tuta kalendaro troviĝas sur blanka tabulo en la unua etaĝo de nia dormejo.*

*tiu apuduniversitata trinkejo ("Tyler's Taproom") ne plu ekzistas. Tamen ankoraŭ restas kelkaj ebloj por trinkemuloj. Vidu la liston fare de Kristofo en la hieraŭa numero. — Red.]*

Ĉiaokaze mi tutsincere deziras al vi ĉiuj, instruantoj kaj instruatoj, malnovaj viktimoj miaj, kiuj malgraŭ miaj klopodoj ja revenis al Raleigh, feliĉan kaj fruktodonan NASK-on!

— *Paul* GUBBINS

# Ĉu ni devus bojkoti Nord-Karolinon?

*de Fred Meyer III*

Estas tiuj, kiuj pensas ke ni devus bojkoti Nord-Karolinon pro la "Neceseja Leĝo" kaj tial ne ĉeesti NASK-on. Mi opinias, ke ni esperantistoj devas zorge respondi al tiu ĉi demando.

La parlamento de Nord-Karolino aprobis leĝproponon "HB2". Tiu propono inter aliaj aferoj kontraŭleĝigas uzon de ŝtataj necesejoj asignitaj al sekso malsama de la naskiĝa sekso de la uzanto. La ŝtatestro de Nord-Karolino, Pat MCCRORY, subskribis la proponon. Ĝi nun estas leĝo. Do oni kromnomis tiun leĝon "la Neceseja Leĝo".

La leĝo diskriminacias pri ankaŭ aliaj aferoj. Interalie ĝi permesas al negocoj diskriminacii kontraŭ samseksemuloj, transvestuloj, transseksuloj, kaj tiuj, kies socia sekso estas malsama de la naskiĝa sekso.

En unu opinisondo, *Public Policy Polling*, nur 36% da nord-karolinaj balotantoj subtenis la leĝon kaj 45% kontraŭis ĝin. Nur 37% de la balotantoj opinias ke ili estas pli sekuraj, kaj 44% opinias ke ili *ne* estas pli sekuraj.

Multaj negocoj reagis al tiu subpremo de civitana libereco. Inter ili estas grandaj negocoj, ŝportnegocoj, kaj koncertantoj. Dum Marto 2016, okdek ĉefaj plenumaj oficiroj (CPO, aŭ angle, CEO) de grandaj negocoj inkludantaj la firmaojn Apple, Pfizer, kaj Marriott subskribis publikan leteron al ŝtatestro McCrory por kuraĝigi lin nuligi la leĝon. Deutsche Bank malfaris planojn dungi en Nord-Karolino. PayPal malfaris planojn por centro de tutmondaj operacioj. Ringo STARR kaj Bruce SPRINGSTEEN inter aliaj nuligis koncertojn.




Multaj homoj opinias ke la leĝo ne necesas. Jam delonge estas transseksidentuloj. Ĝis nun ne estas problemo en necesejoj pri seksperforto fare de ili. Mi neniam ĝis nun aŭdis pri denaska viro kiu ekportis robon por eniri virinan necesejon por seksperforti al virino. Same mi ne ĝis nun aŭdis pri denaska virino kiu ekportis virajn vestojn kaj eniris viran necesejon por seksperforti al viro. Do la neceseja parto de tiu leĝo ne necesas.

Plej grave estas ke la leĝo estas multflanke diskriminacia. La parto kiu rilatas al necesejoj diskriminacias kontraŭ transseksidentuloj. Sed aliaj partoj de la leĝo ankaŭ diskriminacias. Parto de la leĝo forprenas la rajton kortume procesi kontraŭ diskriminaciaj entreprenoj. La leĝo ankaŭ malebligas ke urboj kaj aliaj lokaj registaroj aprobu lokajn leĝojn pri aŭ minimuma pago aŭ infanaj laborkondiĉoj.

Do la demando por ni esperantistoj ĉe NASK estas: ĉu ni devintus bojkoti NASK-on pro tiu leĝo. Mi pensis pri tio tuj post kiam mi aŭdis pri la leĝo. Sed tio okazis post kiam mi pagis mian kotizon kaj aranĝis flugojn. La vero estas, ke tia bojkoto pli damaĝus al ni individue kaj al la fondaĵo ESF (kiu subtenas NASK-on) ol ĝi damaĝus Nord-Karolinon. Bojkotoj povas esti efikaj, sed nur se ili havas pli intensan efikon sur la bojkotata afero ol sur la bojkotanto. Tio ne okazas tie ĉi. Do ni devas ĝui tiun ĉi NASK-on. Kaj ni devas kaj pace kaj agrable peti al ESF ke ili daŭre kontraŭu la leĝon kaj, se necese, ne plu okazigu NASK-on en Norda Karolino.

## Tre apuda vendejo

Apud la manĝejo *Belk* (maldekstre de ĝi, kiam oni staras fronte al la ĉefa enirejo), troviĝas eta librovendejo. Ĝi vendas ne nur librojn, sed ankaŭ diversajn necesaĵojn (ekz. ŝampuon, sapon, dentobrosojn ks.)

La horoj estas jenaj:

- **lunde ĝis vendrede: 10 atm – 3 ptm**
- **sabate kaj dimanĉe: fermita**

